

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Ĉefredaktoro: Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Inĝ-ro R. Orengo, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I * N-RO 9/10

MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

OKTOBRO 1932

Esperantista Lingva Komitato kaj Akademio.

Raporto de la Direktoro de la Sekcio „Komuna Vortaro“

Altestimata Prezidanto,

Mi havas la honoron sendi al via moŝto kaj proponi al la L.K. la preparan liston por la 5-a Oficiala Aldono. Sinceran dankon mi eldiras ne nur al Prof. Waringhien, kiu estis mia precipa kaj plej diligenta kunlaboranto ĉe la pretigo de la listo, sed ankaŭ al S-roj L.K.-anoj Bailey, Bastien, Bennemann, Bobin, Bodo, Butler, Christaller, Lippmann, Millidge, Stamatiadis, Stroele k. a., al kiuj mi ŝuldas interesajn rimarkojn kaj sugestojn. Kiel kutime, tiu ĉi listo al unuj ŝajnas tro longa, al aliaj tro mallonga. Pri tiu ĉi punkto mi kredas, ke estas atentinda la opinio de nia bedaŭrata Prez. CART: kelkajn tagojn antaŭ lia morto li diris al mi, ke estos nepre necesa, post la oficialigo de la 5-a, halto kaj iom longa paŭzo ĝis plua oficialigo.

Tamen la relative malrapida kaj zorge kontrolata plidikiĝo de nia oficiala vortaro estas normala kaj sendanĝera evoluado. Male, la senĉesa, senlima, senkritika kaj senmetoda plidikiĝo de la neoficiala vortaro estas vera epidemio, kiu pli kaj pli intensiĝas kaj iĝas fine maltrankviliga, forte malfaciligante la propagandon. Jam de longe multaj plej aŭtoritataj voĉoj, kaj ankaŭ Zamenhof mem, protestis laŭte kaj energie, sed ĉiam vane kontraŭ la arbitra kaj ne-singarda enkonduko de neologismoj. Mi rememorigu ankaŭ la oficialajn avertojn kaj konsilojn de la Akademio, kiu precize difinis en la „Oficiala Klasika Libro“ kaj en la Deklaracio la devojn de la Esperantistaro:

„La Akademio, malaprobante energie la enkondukon en la komunan lingvon de superfluaĵoj kaj per tio mem nebonaj vortoj, konsilas al la esperantistaro, ke ĝi uzu kun la plej granda modereco sian povon enkonduki novajn vortojn. Estas ĉies devo, antaŭ ol uzi novan vorton, zorge konstati, ke ĝi ne estas superflua.“

Certe estas, ke la beletristoj bezonas vortaron pli riĉan kaj pli nuancan ol la komuna ĉiutaga vortaro. Tamen oni ne troigu tiun bezonon kaj oni apartigu la postulojn de la prozistoj de tiuj de la poetoj, kiuj devas obei la severajn regulojn de ritmo kaj de rimo, kaj al kiuj oni sekve devas esti multe pli tolerema. Kontentigi egale la postulojn de la propagando kaj tiujn de la bel-literaturo kaj precipe de la poezio estas certe malfacila, sed tamen efektivebla tasko, kaj estas esperabile, ke la L.K. trovos praktikan efikan rimedon por bari la vojon al la neologismema manio, respektante la rajtojn de la literaturo. Al mi ŝajnas, ke estus laŭcele, se ĉiu verkanto kutimiĝus akurate enlistigi en la fino de ĉiu sia verko, klarigante kaj pravigante ilin, ĉiujn novajn radikojn, kiujn li enkondukis. Sed estus necese, ke tia klariga kaj praviga listo estu prezentata al la Akademio antaŭ la presigo, tiamaniere ke la

Akademio povu doni aŭ rifuzi aproban kaj rekomendan oficialan dokumenton.

Prof. E. Grosjean-Maupin.

Nico, en junio 1932.

Raporto de la Sekcio por la Teknikaj Vortaroj

Altestimata Prezidanto,

Mi havas la honoron prezenti al vi Raporton pri la laboro efektivigita de fakistoj deponitaj mia lasta Raporto (Marto 1931) pri la teknikaj vortaroj.

S-ro AZORIN (Hispanujo) komencis en „Hispana Esperanta Gazeto“ publikigadon de Vortaro de Arkitekturo, Arkeologio, Konstruo kaj Arto. Ĉiu vorto estas akompanata de bildo kaj de tradukoj en ses lingvojn (hispanan, portugalan, italan, francan, anglan kaj germanan) kaj de klariga noto esperante redaktita. Kiam ĝi estos finita, tiu vortaro, kiu entenas 2000 vortojn, estos unu el la plej gravaj jam verkitaj.

En „Internacia Pedagogia Revuo“ S-ro BENNE-MANN (Germanujo) komencis publikigadon de pedagogia kaj psikologia terminaro. Ĉiu vorto kaj ĝiaj derivaĵoj kaj kummetaĵoj estas difinitaj per teksto.

D-ro SOS (Hungarujo) publikigis Aktuaran Vortaron kun kunlaborado de S-roj Balkányi, Goldziher kaj Kreuz; ĝi entenas tradukojn en anglan, francan kaj germanan lingvojn de la plej gravaj terminoj de tiu fako.

LA LINGVA KOMISIONO DE SOVETRESPUBLIKARA ESPERANTISTA UNIO komencis formadon de grupoj de fakuloj por prilaboro de teknikaj vortaroj; estas ankaŭ celado krei grandan politeknikan vortaron. S-ro HOHLOV kompilas teks-industrian vortaron.

S-ro BAART DE LA FAILLE (Nederlando) daŭrigas laboradi pri botanika terminaro. La nederlanda teksto estas preta kaj preskaŭ pretaj tradukoj franc-kaj germanlingvaj; li klopodas por ricevi aliajn tradukojn.

S-ro MARCEL LAIGNIER (Francujo) verkis terminaron pri komercaj valorpaperoj, kambioj, tratoj, ktp.

S-ro W. HARVEY (Britujo) sendis al ni tabelon de ĉirkaŭ 50 vortoj de Golluda terminaro kune kun iliaj tradukoj en anglan lingvon. La elekto de tiuj terminoj estas bazita sur la celo ke la esperantaj vortoj havu, kiel eble plej, radikojn de la terminoj uzataj en Skotlando, lando, kie naskiĝis tiu ludo.

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA eldonis broŝuron entenantan la Sciencan Esperantan Fundamenton publikigitan en ĝia Bulteno, de S-ro ROLLET DE L'ISLE; estas aldonita alfabeto tabelo donanta, por ĉiu vorto, la ciferojn obligantajn re trovi ĝian difinon en la teksto.

M. Rollet de l'Isle.

Parizo, la 25. Majo 1932.

Kongresaj kunsidoj

de la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio.

En la 1-a kunsido (1. aŭgusto), kiu prezidis D-ro Pierre Corret, Akademiano, helpita de s-ro Kalocsay, kiel sekretario, s-ro de Lajarte, ĝen. sekretario, sciigis, ke s-ro Warden, elektita Prezidanto la lastan jaron post la morto de Prof. Cart, estas devigata, pro grava malbona sanstato, rezigni sian oficon de prezidanto kaj aliajn postenojn en la Lingva Komitato. La ĉeestantoj (16 membroj) unuanime sendigis al s-ro Warden la esprimon de sia granda bedaŭro kun danĝoj pro la gravaj servoj, kiujn li faris al nia afero, ankaŭ al s-ro Harvey, la Edinburga Kolego, kiu de la lastaj monatoj bonvolis helpi lin en lia malfacila tasko.

S-ro de Lajarte poste konigis la jenan rezultaton de la elekto en la Komitato, en kiu partoprenis 101 anoj (absoluta plimulto: 51 voĉoj):

S-ro Aymonier (96 voĉoj)
S-ro Rollet de l'Isle (95 voĉoj)
S-ro Kenn (93 voĉoj)
S-ro D-ro Leono Zamenhof (92 voĉoj)
S-ro Sevak (92 voĉoj)
S-ro Jirkov (90 voĉoj)
S-ro Orenge (90 voĉoj)
S-ro Oscar van Schoor (90 voĉoj)
S-ro Jansson (89 voĉoj)
S-ro Miĥalski (87 voĉoj)
S-ro Blicher (85 voĉoj)
S-ro Domingues (85 voĉoj)
S-ro Cseh (Pastro Ĉe) (84 voĉoj)
S-ro Chavet (82 voĉoj)
F-ino Baird (82 voĉoj)
S-ro Bugge-Paulsen (82 voĉoj)
S-ro Bonnevie (81 voĉoj)
S-ro Wadham (81 voĉoj)
S-ro Couteaux (80 voĉoj)
S-ro Porto Carreiro Neto (76 voĉoj)
S-ro Archdeacon (75 voĉoj)

De nun estos reprezentataj en la LK la armena, norvega kaj persa lingvoj.

La balotado por la tri postenoj vakantaj en la Akademio donis nur la jenan rezultaton:

S-roj Aymonier (77 voĉoj) kaj Butler (58).

La aliaj kandidatoj ne atingis la necesan absolutan plimulton.

Oni do devos denove okazigi balotadon pro la ekzisto de s-ro Prez. Warden, tiom pli ke s-ro Butler, pro diversaj motivoj, sciigis, ke li ne povas akcepti akademian ĝon.

La 2-a kunsido okazis, la 4-an de aŭgusto sub prezido de s-ro Intendant-Generalo Bastien, kun la helpo de sama sekretario, s-ro Kalocsay. Ĉeestis 25 anoj.

Ĝi estis dediĉata al ĝenerala esploro de la demando pri oficialigotaj vortoj laŭ listo starigita de s-ro Grosjean-Maupin por V-a Aldono al UV.

Post interŝanĝo de opinioj estis de-

cidite, ke al s-ro Grosjean-Maupin, kiu ne povis ĉeesti la kongreson, estos sendataj la rimarkigoj kaj pripensoj ricevitaj. Li bonvolos ilin kuncentrigi kaj decidigi de la Akademio liston, kiu estos submetata al definitiva aprobo de la LK-anoj.

Post fino de la kunsido la ĉeestintaj membroj, sub gvidado de s-ro de Lajarte, iris kun multaj Parizaj kaj alilandaj kongresanoj en la tombelon »Père-Lachaise« viziti la tombon de ilia karmemora prezidanto, Prof. Th. Cart.

R. L.

Publikigante tiun ĉi raporton, ni deziras esprimi nian kontentecon pri tio, ke la novelektitaj LK-anoj senescepte gvas la reputacion de bonegaj sciantoj de nia lingvo; kelkaj eĉ estas eminentaj praktikistoj. Ni antaŭvidas, ke nur per elekto de tiaj kompetentuloj niaj lingvaj institucioj povas akiri, resp. konservi la eksterordinaran

Bruno Migliorini:

La artefaritaj elementoj

en la naciaj lingvoj.

(Prelego farita ĉe la Internacia Somera Universitato, Parizo 1932.)

La plej grava argumento, kontraŭ kiu la adeptoj de lingvo internacia devas lukti, estas la antaŭjuĝo, laŭ kiu ekzistas esenca diferenco inter la tiel nomataj naturaj kaj la artefaritaj lingvoj.

Sed ĝis kiu punkto tiu diferenco reale ekzistas, ĝis kiu punkto ĝi estas antaŭjuĝo?

Ĝi ĉefe dependas de la ideoj pri la lingvo, kiuj estas disvastigitaj de la Romantiko. Laŭ la ideoaro de tiu epoko, la vera kreado estas nur la Popolo. Ĝi kreis en la pratempoj la lingvojn, ĝi kreis la grandajn epopeojn, la legendojn kaj la kantojn kiuj ankoraŭ flugas sur la buŝoj de la simpluloj ne koruptitaj de la civilizacio, ĝi kreis la mirindajn katedralojn. Homero ne ekzistis aŭ nur kunkudris antaŭajn kantojn; kaj simile okazis pri la franca Roland-epopeo.

Dum la XIX-a jarcento tiuj ideoj estis ĝenerale akceptataj — kaj de ili burĝonis novaj sciencoj; ekz. la pioniroj de la lingvistiko ĉefe serĉis en la lingvo dokumentojn pri la popolaj prakreaĵoj, kaj konsideris evoluon la prahistorion de la lingvoj, preskaŭ nur koruptigo la historion.

Ĉefe pro tio, la lingvistiko fariĝis scienco historia, kiu nur interpretas la lingvojn kiel historiajn dokumentojn, kaj rifuzas iel partopreni en ilia evoluado.

Gravaj postsignoj de tiu romantika origino restis en la lingvistika konceptaro kaj metodologio: ekzemple la fakto, ke oni konsideras pli gravaj por la scienco la dialektojn ol la kulturlingvojn. Kaj nur rilate al tiu konceptaro oni povas kompreni la fakton, ke la oficiala lingvistiko ĝenerale neis la eblecon krei artefaritan lingvon. Ĉe la fondo de la Société de Linguistique de Paris

gravecon, kiun ili havas por nia tuta movado. Al la elektitoj ni prezentas nian koran gratulon.

Pri la listo por la V-a aldono de la Universala Vortaro ni ĝojas, ke racio kaj prudento gvidis la kunsidintojn en Parizo. La denova revizio de la pretigita listo ebligis mezuri ankoraŭ pli severe pri la utileco kaj neceseco de tuta vico da vortoj proponitaj por oficialigo.

Intertempe nia rumana kolego H. Fischer-Bukureŝto diskonigis al la membroj de la LK sian juĝon pri la listo nun starigita. Ni povas plene aprobi la vidpunkton de s-ro Fischer, kvankam pri kelkaj vortoj ni ne tute samopiniis kun li. Sed estas neniu dubo pri tio, ke la LK-anoj portas grandan respondecon en sia zorgo pri la evoluo de nia lingvo. Ni deziras kaj atendas, ke ĉiuj estos konsciaj pri tio okaze de definitiva decido. Nia lingva laboro devas atingi multe pli altan nivelon kaj ĝi devas esti farata kun multe pli da metodo kaj sistemo. Ĉar ĵus estas diskutata la demando pri plena reorganizo de la tuta movado, ni atentigas pri la neceseco de taŭga surkonstruo de niaj lingvaj aŭtoritatoj per disponigo de monrimedoj sufiĉaj. Tiam krom plibonigo de la prilingva laboro, ankaŭ modernigo de la teknika laboro estos ebla por igi multe pli efika la tutan agadon. Rob. Kreuz, LK.

(1866) oni oficiale deklaris en la statutoj, ke diskuto pri tiu temo estas malpermesataj.

Sed en la lastaj jardekoj novaj konceptoj iom post iom disvastiĝis en tiu fako kaj ĝenerale en la filologio. Oni denove kredas pri Homero, aŭ almenaŭ pri du aŭtoroj de la arkitekturo de Iliado kaj de Odiseo. Oni pruvis, ke la mezepokaj francaj epopeoj ne estas popolaj kantoj florintaj sub la Karlidoj, sed individuaj kreaĵoj de monaĥoj dum la XI-a kaj XII-a jarcentoj. Oni markis la etapojn tra kiuj disvastiĝis la t. n. gotika stilo de la katedraloj: ĉe la komenco de tiu ĉeno estas ne la senombra popolo, sed anonima arkitekto, kiu genie interpretas la aspiron de sia generacio.

Same pri la lingvo. Oni pli kaj pli rekonas la gravecon de la kulturlingvoj, kaj pluraj lingvistoj partoprenas en pluraj landoj al reguligo kaj pliriĉigo de la naciaj lingvoj: ekz. ĉe Islandanoj, ĉe Latvoj, ĉe Kirgizoj.

Kiel la botanikistoj profitis je la spertoj atingitaj per florkulturo kaj ĝardenarto, tiel ankaŭ el la spertoj de sciencaj kaj teknikaj terminologioj, el la studo de la anstataŭado de naciaj vortoj al fremdaj krejigas, flanke de la historia lingvistiko, nova aplikita scienco: la lingvotekniko.

La dua kongreso de lingvistoj, okazinta en Genevo dum 1931, estas unu el la plej rimarkindaj etapoj sur tiu vojo. Unu el la ĉefdemandoj adresitaj al la kongresanoj celis ĉefe la parton, kiun la volo kaj la konscio ludas en la lingva evoluado kaj akcesore la problemon de lingvo internacia. La fakto mem, ke la du problemoj estas konsideritaj en tiel intima interrilato estas tre grava, sed eĉ pli gravaj estas la ricevitaj respondoj

kaj la raporto per kiu Prof. Jespersen resumis ĉe ĝenerala kunsido de la kongreso la opiniojn de la respondintoj kaj siajn proprajn. Li substrekiĝis, ke la konsciaj kaj intencaj agoj en la t. n. naturaj lingvoj estas ĝis nun tro malmulte konsideritaj de la lingvistoj, kiuj tro afektis malzorgi la praktikon. Montrinte per pluraj ekzemploj kion gravecon ili havas, li insistis por ke la diversnaciaj lingvistoj pli multe helpu kontroli tiajn aferojn en siaj propraj lingvoj, kaj ne lasu ilin al dietantoj, t. e. al fuŝantoj. Samajn riproĉojn kaj alvokojn li faris pri la L. I., ne nur pledante por ĝia alprenado, sed atestante pri la utileco, kiun scienculoj povas ricevi de la studado de tiu problemo.

Ni ĉeestas do gravan revolucion en la ideoj de nuntempa lingvistiko, kiu espereble estonte influos la komunan opinionon. Gravos ankaŭ, ke oni estu bone informata pri tiu temo, t. e. pri la graveco de la konsciaj kaj intencaj influoj en la naturaj lingvoj. La temo estas tre malnova, ĉar jam la grekaj filozofoj diskutis ĉu la lingvo estas „natura“ aŭ „almetita“ de la homoj, sed nun ĝi fariĝis denove aktuala.

Kompreneble tiaj influoj estas multe pli gravaj kaj pli facile konstateblaj en kelkaj flankoj de la lingvo ol en la aliaj; malmultajn oni povas citi en la morfologio kaj en la sintakso, kelkajn en la fonetiko, multegajn en la vortaro.

Rimarkinda ekzemplo de la intencata surmetado de nomoj estas la personaj nomoj. La patro kiu elektas nomon por sia filo ĝin elektas libere, konscie kaj preskaŭ arbitre, el grandega serio, kiun la tradicio liveras al li; kelkfoje la patro eĉ forĝas mem la nomon, kaj tio estis kutima en kelkaj lokoj kaj tempoj. Guste unu el la grekaj filozofoj, kiu asertis, ke la lingvo estas konvencia, donis al sia sklavo la nomon *Epeiden* (t. e. la konjunkcio „post kiam“), por pruvi tian konvenciecon. Sed oni devas rimarki, ke la propraj nomoj estas ĉe la marginoj de la lingvoj, ĉar ili ne indikas ĝeneralajn konceptojn, sed nur individuojn.

La samon ni povus diri pri lokaj nomoj, ĉe kiuj ni mem ĉeestis en la dum- kaj postmilitaj jaroj multajn novforĝadojn kaj ŝanĝojn. Ekz. la nomo de la aŭstra provinco *Burgenland* estas forĝita nur en 1918; la ŝanĝojn de *Petrobrugo* al *Petrogrado* kaj *Leningrado*, de *Kristiania* al *Oslo*, la diskutojn pri *Trondhjem* ŝanĝita al *Nidaros* kaj reŝanĝita al *Trondheim* vi certe memoras.

Sed mi intencas ĉi tie iom halti ĉe la ekzamenado de pluraj vortoj, ĉe kiuj ni provos rekoni la stampon signitan de iliaj kreintoj. La granda lingvisto Schuchardt jam admonis, ke oni devas distingi por ĉiu lingva novaĵo du fazojn: ĝian originon kaj ĝian disvastiĝon (*Schuchardt-Brevier*, 2-a eldono, Halle 1927, p. 376); Prof. Kretschmer ankaŭ diferencigas la „vortkreatojn“ de la „vortelektantoj“ (*Die Wortschöpfung*, Vieno 1925, p. 19): kaj tiu diferencigo estas tre grava.

Ĉe la origino de ĉiu vorto estas individuo, la vortforĝanto, aŭ, se ni volas uzi la esprimon de Platono (*Kratilo*, 388 e) la onomaturo.

Sed la novekreitaj vortoj povas ĉu forflugi senefie en la neniaĵon, ĉu ricevi la aprobon de la multularo, kaj nur en tiu dua okazo ili fariĝas vere elementoj de la lingvo. La vortforĝanto ne povas do inventi arbitre kaj hazarde: ili devas antaŭdiveni kaj interpreti tiun saman neceson kiun post ili sekvas la vortelektantoj, kaj dank' al kiu la vortoj cirkulados kaj fariĝos ĝenerale uzataj.

Tre malmultajn ekzemplojn oni povas do citi de vortoj arbitre inventitaj, forĝitaj ekster la serioj jam ekzistantaj en la lingvo. La vorto *baroko* estas unu el tiuj. Dum mezepoko la skolastika filozofio forĝis por la diversaj tipoj de silogismoj memorvortojn, kies literoj aludas al la elementoj de la silogismo: *Barbara, celarent, darii, ferio* ktp.: ekz. la vorto *barbara* korespondas al silogismoj de la tipo: Ĉiuj homoj estas mortemuloj — Ĉiuj negroj estas homoj — do: Ĉiuj negroj estas mortemuloj. La strangaĉo de kelkaj el tiuj vortoj kaj la enuo pri la skolastika metodo igis la vorton *baroko* sinonima de „pedanta“: en la XVI-a kaj XVII-a jarcentoj oni parolis pri argumentoj aŭ silogismoj en *baroko*. Kiam la arkitektura stilo de la XVII-a jarcento komencis malplaĉi, la kritikistoj vokis ĝin mallaŭde *baroka*, t. e. „stranga“, kaj tra tiu vojo la artefarita vorto atingis ĝeneralan cirkuladon.

Iom arbitra estas ankaŭ la vorto *sinovio*, t. e. la nomo de la fluidaĵo kiu troviĝas ĉe la artikolo de la genuo, forĝita en la XVI-a jarcento de la natursciencisto Paracelso (*synovia*); oni iel rekonas en ĝi la grekan prepozicion (*syn* = kun), sed la dua parto eble eliras el la fantazio de la aŭtoro.

Preskaŭ fantazia estas ankaŭ la vorto *gaso*, forĝita de la Brusela ĥemiisto van Helmont ĉe la komenco de la XVII-a jarcento. Parolante pri iu „spiraĵo“ kiu formiĝis dum eksperimento (kaj kiu estis karbonoksido), li diris ke li „vokis tiun spiradon *gas*, ne malproksime de la faoso de la antikvuloj“ (*halitum illum gas vocavi, non longe a chao veterum*). Oni memoru, ke flandre oni prononcas *g* kiel sonorano *h*, kaj ke tiamaniere la vorto tre similas unuflanke la grekan *haos*, kaj aliflanke la flandran *geest*, t. e. „spirito“. Ankaŭ en arbitre forĝitaj vortoj oni konstatas do pli malpli videblajn signojn de antaŭaj vortoj.

Fantaziaj estas la nomoj de la landoj en la famaj Vojaĝoj de Gulliver de Swift: kaj dank' al tiu famo diskoniĝis la vorto *liliputa*.

Kiel lastan ekzemplon mi citos la vorton *kodak*, inventitan de Georgo Eastman, kiu tre bone esprimas per ĝiaj sonoj la malfermiĝon-fermiĝon de la kamero. Certe ĉu en la kreado ĉu en la disvastiĝo de la vorto ĉefe efikis tiu onomatopea valoro, kaj la aŭtoro en diversaj okazoj substrekiĝis la kvalitojn de la nomo: mallonga, ne misprononcebla, ne simila al iun alian ekzistantan vorton (Ch. W. Ackerman, G. Eastman, Londono 1930, p. 76). Ĉar la vorto aperis en 1888, t. e. en la jaroj de la Volapūka florado, oni kredis rekoni en ĝi la volapūkan vorton *kodakan* „plastiko“, sed la kategoriaj asertoj de la aŭtoro mem igas tion neverŝajna.

Se oni povas citi tre malmultajn ekzemplojn de vortoj fantazie forĝitaj, oni povas citi tre multajn, kiuj unuafoje aperis en konataj cirkonstancoj, pro kreado de iu individua aŭtoro. Se la unuaj estas arbitrefaritaj, tiuj lastaj estas artefaritaj.

La greklatinan vorton *monopolo* forĝis, laŭ Suetono kaj Diono, la imperiestro Tiberio.

Utopio estas la greka nomo de la fantazia lando priskribita de la kanceliero Tomaso Moro (1516); t. e. u „ne“, topos „loko“; laŭvorte *Nelokujo*.

La terminon *elektra* (*electrica vis* ktp.) forĝis ĉe la komenco de la XVIII-a jarcento la anglo Gilbert por esprimi la forton kiun oni produktas frotante la sukconon (gr. *elektron*).

La unua enciklopedio kiu havas tiun ĉi nomon estas tiu de Alsted en 1630.

La *logaritmon* difinis kaj baptis en la XVII-a jarcento la matematikisto Napier.

Pri *dualismo* parolis la unuan fojon la historiisto Hyde en 1700, aludante la religion de la antikvaj Persoj, kiuj distingis la du principojn de la bono kaj de la malbono.

Burokrato estas forĝita de la ekonomisto Victor de Gournay.

Mistiiki, t. e. france *mystifier*, estas origine serĉo al iu sinjoro Poinset, forĝita per la radiko de *mystère, mystique* kaj la sufikso *-fier* de lat. *-ficare*.

Pri *internacia*, vorto tiel necesa hodiaŭ, preskaŭ sin senkulpigis la kreinto, la fama angla ekonomisto Bentham: „la vorto *international* — oni devas tion rekoni — estas nova; kvankam ĝi estas, espereble, sufiĉe analogia kaj komprenebla“.

Al la granda filozofo Kant ni ŝuldas esprimojn kiel *antinomio, kategoria imperativo*.

La fundamenta laŭsistemigo de la nomenklaturado de botaniko kaj de zoologio okazinta dank' al Linné kaj tiu de la ĥemio dank' al Lavoisier kaj Guyton de Morveau, por citi nur tri sciencojn, puŝas al kreado de multegaj novaj terminoj kaj al signifikiĝado de pluraj aliaj. Ekz. kiam Linné alprenas la latinan vorton *larva*, t. e. „fantomo“ aŭ „masko“, kaj ĝin uzas por indiki fazon de la vivo de la insektoj, aŭ kiam Cuvier donas al la latina adjektivo *moluscus*, t. e. „duonmola“, substantivan valoron kaj precizan zoologian signifon, ni ĉeestas, se ne vortforĝadon, ĉar la vortoj jam ekzistis, vortreforĝadon.

La vorto *vandalismo*, kreita dum la Franca Revolucio de energia agitisto kaj organizisto, abato Grégoire, episkopo de Blois, membro de la Nacia Konvencio, estas taŭga ekzemplo de vorto naskita ne pro logikaj, sed pro sentimentaj kaŭzoj: por energie esprimi la malŝaton al tiuj kiuj detruis la antikvaĵojn laŭ la malbonfama ekzemplo de la barbaraj Vandaloj. Li rakontis mem en sia *Memorlibro*, publikigita en 1837, la cirkonstancojn de la invento: „Kelkaj furiozuloj estis proponintaj ekruligi la publikajn bibliotekojn; ĉiuflanke oni rabdetruis la librojn, la pentraĵojn, la monumentojn kiuj portis signojn de la religio, de la feŭdalismo, de la reĝeco . . . tiel gravaj estis la eksceso, ke fine mi povis utile aŭdigi mian voĉon, kaj oni konsentis ĉe la komitato ke mi prezentu ĉe la Konvencio raporton kontraŭ la *vandalismo*. Mi kreis la nomon por detruo la aferon . . .“ Tri raportojn li prezentis kontraŭ la *vandalismo* en la jaroj 1793—94; la vorto rapide disvastiĝis en la tuta Eŭropo. Ĝi estas ankaŭ uzita en oficialaj dokumentoj, sed kompreneble oni uzis ĝin ĉefe post la fino de la Teroro (kp. M. Frey, *Les transformations du vocab français à l'époque de la Révolution*, Paris 1925, pp. 265—266).

Por la XIX-a jarcento kaj la nuna restas al ni tiel multe da dokumentoj, kompare kun la pasintaj, ke oni povas pli facile retrovi naskiĝatestojn de vortoj, kaj rekoni iliajn patrojn. Mi citos, iom hazarde, de diversaj provincoj de la vortaro, *cinematiko*, forĝita de Ampère, *folkloro*, uzita de la angla sciencisto Thoms en 1846, *altruismo* kaj *sociologio*, kreitaj de la fondinto de pozitivistino A. Comte, *filatelo*, proponita de Herpin en *poŝtmark-revuo* en 1864, *aviado*, forĝita de Joseph-Gabriel de la Landelle en 1869, *mikrobo* proponita de Sédillot al la Franca Akademio de Sciencoj en 1878, *difterito*, ekuzita de la fama patologo Virchow, me-

tapsifiko forĝita de Richet laŭ la modelo de metafiziko, futurismo kreita en 1905 de Marinetti, kaj tiel plu, kaj tiel plu.

Kiuj estas la fontoj de tiuj ĉi vortoj? Preskaŭ neniam ili estas arbitraj, plejofte ili konsistas el elementoj jam konataj en la lingvo aŭ el latina aŭ greka radikaro, ĉiam konsiderita de la eŭropaj kulturlingvoj kvazaŭ libere ĉerpebla rezervo; tiuj elementoj, modifitaj per prefikso aŭ sufikso, fariĝis pretaj alpreni difinitan signifon.

En aliaj okazoj, malnova formo prenis, dank' al metaforo, pli malpli novan valoron. Jus ni citis la ekzemplon de la vorto **larvo**, al kiu Linné donis speciale natursciencan signifon. La vorto **tank**, kiu signifas angle „rezervujo“ estas metafore aplikita, en januaro 1916, de Koloneloj Swinton kaj Dalry-Jones por indiki la nove inventitan „kirasitan militĉaron“, ĉar oni volis ĝin kaŝi kontraŭ la spionado dum la eksperimenta fazo.

Precize atribuebla al difinita persono estas kelkfoje ankaŭ la importado de fremdaj vortoj. La franca poeto Ronsard, la fondinto de la Plejado, aroĝis al si la meriton esti enkondukinta en la francan lingvon la greklatinan vorton **ode** per siaj odoj; la natursciencisto Buffon vidis en foirejo ĝibobovon, demandis ĝian nomon al la foiranoj kiuj montris la beston, kaj la terminon kiun ili donis, **zebuo** (oni ne bone scias ĉu ĝi estis efektiva vorto de la origina lando, aŭ fantazio de ili mem), eniris en la eŭropan vorttrezoron dank' al Buffon. Same, Darwin importis en Eŭropon terminon de la Maledivaj insuloj, t. e. **atolo**, la nomo de la koralaĵ rondinsuletoj.

La kreinton oni povas ofte indiki ankaŭ por la vortoj forĝitaj en la naciaj lingvoj por anstataŭi fremdvortojn.

De tempo al tempo, post periodoj en kiuj la lingvoj senbride akceptis multnombrajn fremdajn, sekvas pli nacismaj periodoj, kiuj klopodas forpuŝi ilin. Kelkajn el tiaj novaj esprimoj la germana lingvo ŝuldas al la vortaro de Campe, aperinta en 1801. La vorto **abrŭsten** en la signifo „malarmi“ estas kreita nur en 1862 post longa pripensado de la verkisto Paul Lindau.

Ni vidis la vorton **tank**. Dum kelka tempo oni uzis ankaŭ en la franca armeo la anglan esprimon; sed post cirkulero de generalo Etienne oni ekuzis anstataŭ ĝi la terminon **char d'assaut**, t. e. „ataĉĉaro“.

Jus en Italujo ni ĉeestis similan fakton. Ĝis nun en la itala vortaro ne ekzistis la ebleco esprimi per propraj rimedoj la koncepton **chauffeur**, kaj oni uzis la francan vorton, pli malpli kripligante ĝin ĉar la sono ŝ ne ekzistas en la itala lingvo (nur en kelkaj dialektoj). Antaŭ kelkaj monatoj, cirkulero de la Nacia Transportfederacio ordonis, ke la federacianoj uzu la terminon **autista**, kaj ĝi tre rapide disvastiĝis. Ĝi havas, kontraŭ la termino **chauffeur**, ne nur la avantaĝon ke ĝi ne havas fremdajn sonojn, sed ke ĝi estas, ni diru, travidebla: ĝia radiko estas tuj komprenebla kaj ĝia sufikso oportune memorigas, ke la vorto signifas metion. La faktoro de la klara analizebleco estas tute same aplikebla ĉu en la artefaritaj elementoj de la naciaj lingvoj, ĉu en la artefaritaj lingvoj kiel Esperanto. En la listo de la vortoj ĵus prezentitaj al la nuna baloto ĉe la Lingva Komitato por la eventuala oficialigo, troviĝas la vorto **ŝoforo**: mi opinias, ke estus pli utile ne oficialigi ĝin kaj prefere uzi kunmetitan analizeblan terminon, kiel **motoristo**; por motoristoj de publikaj aŭtomobiloj la vortoj **taksiisto** aŭ eventuale **aŭtisto** estus preferindaj.

Ni vidis ĝis nun ĉefe ekzemplojn en kiuj la historio de difinita vorto komenciĝas dank' al iu aŭtoro, en difinitaj loko kaj dato. La fakto, ofte malatentata de la lingvistoj, estas tiel bone konata de natursciencistoj, ke ili eĉ provis reguligi ĝin per la antaŭec-regulo (règle de priorité) validanta en la sciencaj nomenklaturaj, ĉefe en zoologio kaj botaniko. Oni ne povas ŝanĝi sen gravaj kialoj la terminon kiun la difininto de la besta aŭ planta grupo fiksis por ĝi. La termino, kiel ni vidis por la terminoj **larvo** kaj **molusko**, povas ankaŭ ne esti nova; sufiĉas ke ĝi estu ricevinta novan sigelon, ke ĝi estu jaŭnormigita de nomenklaturisto.

En la historio de la vortoj, ni vidas do ofte, post la unua apero de la vorto, unu aŭ plurajn restampadojn, kvazaŭ poŝtmarko stampita per la figuro de iu reĝo, kiu ricevas novan tekston post ŝanĝo de la reĝimo.

Prof. Kretschmer citas, kiel ekzemplon de tiu restampado flanke de pluraj sinsekvaj aŭtoroj, la vorton **ideo**. **Ideo** dependas lastlinie de la greka vorto **idea** „aspekto, figuro, laŭbildo“, derivaĵo de **idein** „vidi“. Ĝia kreinto estas nekonata. Ĉe Herodoto, Aristofano, Tucido ĝi havas la ĝeneralan ideon de „maniero“, ankaŭ „regulo“. Poste Platono alprenis la vorton por sia teorio de la ideoj kaj indikis per tiu termino la prabildon de iu aĵo, ĝian internan esencon. La mezepoka latina lingvo adoptis la vorton kaj kreis flanke de ĝi la adjektivan idealis „laŭmodela, ideala“, kiu en la mezepoka filozofio ricevis la signifon de „(nur) imagita, pensa, koncepta, spirita“. En la XVII-a jarcento ankaŭ la vorto **idea** estas uzita de Descartes en la signifo de „percepto, penso“. Descartes estis konscia pri tiu nomaplikado; li skribis en 1642: **ostendo me nomen ideae sumere pro omni eo, quod immediate a mente percipitur**. La greklatina vorto **idea** kaj ĝia franca formo **idée** disvastiĝis komence de la XVIII-a jarcento en la eŭropaj lingvoj. Tial la vorto **ideo** estas kreita 1-e de kelkaj nekonataj vortkreintoj, 2-e de Platono, 3-e de Descartes.

Ni daŭrigu la historion por unu el ĝiaj derivaĵoj, la vorton **ideologo**. Kreita en 1796 de la filozofo Destutt de Tracy por difini la sciencan kiu studas la formadon de la ideoj en la homa menso, la vorto estas aplikita, verŝajne en 1807, de Napoleono al tiuj el liaj kontraŭuloj (inter kiuj Destutt de Tracy) kiuj opoziciis al li en la nomo de filozofiaj principoj: **ideologo** fariĝis en lia buŝo sinonimo de „vanta parolemullo“.

Post la jam multnombraj ekzemploj, kiujn ni vidis, ni jam kapablas iam flari, por tiel diri, la vortautorojn. Multaj el la vortoj, kiujn oni povus naive kredi antikvegaj en niaj lingvoj, naskiĝis hieraŭ aŭ antaŭhieraŭ: Kiu kredus, ke tiel karakteriza angla vorto kiel **beautiful** ne aperas en la angla vortrezoro antaŭ la XVI-a jarcento, antaŭ la traduko de la Biblio farita de Tyndale, kaj ke ĝi estas eble kreita de tiu tradukinto aŭ ĉiukaze en lia epoko?

Ni citos do nun kelkajn ekzemplojn en kiuj la aŭtoro estas nekonata, sed sufiĉe verŝajne konjektebla: ni konas pli malpli la lokon kaj la daton de la apero, kaj tio estas sufiĉa por aserti, ke individua renkontiĝo ekzistas — aŭ eble hazarda renkontiĝo de du — tri inventistoj — kiel la ekzisto de la fumo igas nin certaj pri la ekzisto de la fajro. La vorto **ciytizen** (civitano), kiu antaŭ la franca revolucio signifis nur „urbano“, kaj, en la XVIII-a jarcento, ankaŭ „civitano“, akiris en la franca Konstitucio de 1791

la signifon „ŝtatan“. En majo 1792 la unuan fojon ĝin uzis vokative kiel titolon la Pariza urbestro, kaj de tiam ĝi rapide anstataŭis la titolon **Monseŭr**, kiu reaperis nur sub Napoleono. Verŝajne ne la urbestro mem, sed iu individuo en lia ĉirkaŭaĵo elpensis tion, aŭ memoris pri la fakto ke Rbousseau konsideris kiel honortitolon la nomon de „Geneva civitano“ kaj deziris esti vokata ne „sinjoro“ sed „mia kara civitano“.

Jen vorto origine reklama, **fantasmagorio**, kiu estis la unuan fojon uzata en Londono en 1802 de iu impresario de optikaj iluzioj.

La latinan vorton **omnibus**, t. e. „por ĉiuj“, oni aplikis en Parizo en 1828 al la tiam ekuzitaj omnibusoj.

La termino **krako** disvastiĝis post la krako de la Viena borso en 1873.

Tiuj ĉi vortoj, kaj pliaj centoj kiujn oni povus citi, estas evidente inventitaj de individuo kaj rapide disvastiĝis dank' al favoraj cirkonstancoj.

Tiu aŭtoreco estas kelkfoje rekonebla laŭ iaj signoj. Kelkfoje la formo, kelkfoje la signifo permesas al ni konjekti malantaŭ la vorto la inventinton. Ni rigardu ekzemple la mallongigojn de la vortoj, kiuj tiel multe disvastiĝis dum la lastaj jardekoj: mallongigojn per komencaj literoj (**FIAT** = Fabbrica Italiana Automobili Torino; france **T. S. F.** = **télégraphie sans fil** = senfadena telegrafio), aŭ per komencaj silaboj, kiel ofte en germana kaj rusa lingvoj (ekz. **Komintern** ktp.). Evidente ĉiuj similaj formoj estas forĝitaj de individuoj. Aliaj formoj de mallongigo, ekz. fr. **aristo** anstataŭ **aristocrate**, aŭ la angla bus anstataŭ **autobus** ŝajnas pli popularaj, sed se oni scias ke la dana formo **bil** anstataŭ **automobil** estas proponita en 1904, dum konkurso farita de grava gazeto, ĉu oni povas dubi ke iu anonima inventinto ekzistas ankaŭ por **bus**? Same pri la signifo. Ĝiam ni renkontas metaforon, kiu montras ne banalan bildon, ni povas aserti ke ĝin inventis iu persono.

Mi ne scias, ĉu oni serĉis tiun, kiu donis al la usonaj turdomoj la nomon **skyscrapers** „ĉielskrapantoj“, aŭ tiun, kiu aplikis unue al varieteaj kaj poste al kinematografiaj unuarangulinoj la titolon **stars** (stelulinoj); mi estas nepre certa, ke tiuj nomoj ne naskiĝis de la amaso, sed de iu individuo, kiu kreis metaforon, kiel poeto kreas bildon.

Sed eble ni povus rimarki, ke mi preskaŭ nur citis modernajn vortojn. Jen terminoj filozofiaj kaj sciencaj, vortoj rilatantaj al vestoj, al frizado, al gastronomio, patentkaj reklam-vortoj, nomoj de mezuroj, agitvortoj, devizoj, nomoj de skoloj kaj partioj. Ĉi tie, kompreneble, estas facile konjekti aŭ eĉ retrovi aŭtoron. Sed ĉu estas same por la pravortoj de la lingvo, por vortoj kiel **patro** aŭ **vidi**, vortoj kiuj pasis de buŝo al buŝo dum jarcentoj kaj jarcentoj, vortoj kiujn ni heredis de la avoj de niaj avoj, de niaj plej malproksimaj prapatroj?

Ni havas nenium motiven por kredi, ke ĉe praantikvuloj la lingvokreado kaj la lingvo-cirkulado estis **esence** malsama ol ĉe ni. Certare ankaŭ ĉe la nunaj primitivuloj oni konstatas, ke **esence** malsama ĝi ne estas, kaj oni povis citi la disvastiĝon ĉe la Fulbe-Negroj de vorto **fottoki** „lango“, forĝita de germana esploristo Heinrich Barth per elementoj de la Fulbea lingvo (Kretschmer, v. c., p. 11).

Kaj mi vidas nenium malfacilecon en la hipotezo, ke ankaŭ la vortoj de la plej antikva vortrezoro estas inventitaj de indi-

viduoj, interpretantaj la ideojn de la grupo, kaj akceptitaj de la grupo mem.

Cetere, tiu ĉi hipotezo ne estas sensacia novaĵo: ĝi estas, esence, konforma al la Biblia rakonto, laŭ kiu, pro Dia ordono, Adamo vidis, kiun nomon li donu al ĉiuj bestoj de la tero kaj de la ĉielo (Gen., II, 19-20).

La tiel nomataj naturaj lingvoj estas do entute rezultato de sennombra sinsekvo de konsciaj, intencaj, artaj agoj de individuoj, akceptitaj pli malpli konscie de la amaso de la parolantoj.

Kaj, revenante al la demando kiun ni faris al ni ĉe la komenco, ĝis kiu punkto ili do diferencigas de la artefaritaj lingvoj?

La diferenco ne estas esenca, sed grada.

En la artefaritaj lingvoj la vortkreado estas ne nur intenca, sed ankaŭ laŭplana: tion prave montris Prof. Funke kaj Inĝ. Wüster. Kaj ankaŭ ĉi tie gradoj ekzistas: ni jam konstatis, laŭnormigo, laŭplanigo ekzistas ankaŭ en la naturaj lingvoj, en kelkaj fakaj nomenklaturetoj, ekz. zoologio kaj botaniko.

Se ĉe la vortkreado la aŭtoro reale interpretis la neceson de la amasoj, kaj la amasoj akceptas la inventon, la arto fariĝas naturo.

Kaj ĝuste pro tio la svarmantaj projektoj de artefaritaj lingvoj kaj Esperanto abisme diferencigas: ĉar la projektoj estas teori-aj kaj Esperanto malgranda vivanta lingvo de malgranda vivanta popolo.

kaj kaptataj" (vidu la artikolon en L. Kr. n-ro 5, p. 1—2). Sed Zamenhof kaj ankaŭ aliaj bonaj verkistoj ofte neglektis la loĝikon favore al imitado de nacilingva kutimo; do oni ankaŭ ne povas nomi la frazon malkorekta. Estas rekomendinde, eviti la formojn kun -ita, kiam la logiko postulas -ata. La uzantoj de ita-formoj devus, analogie, ankaŭ uzi ita-formojn, do: estis irintaj en la arbaron; tie ili estis subite atakitaj kaj kaptitaj" — sed tiun konsekvencon ili neniam aplikas.

31. Participa adverbo.

La uzado de participo aŭ participa adverbo ofte dependas de la senco, kiun la aŭtoro intencas esprimi per ĝi: *ĉeestinta* = kiu ĉeestis; *ĉeestinte* = post kiam ĝi ĉeestis.

32. Prepozicio (por, pro).

Ni diras: Oni dankas helpiton pro helpo al la helpito. En Esperantujo regas iom da konfuzo koncerne la aplikadon de por kaj pro. Por signifas celon, pro kaŭzon. Do, korekte, oni devus peti por (aŭ: pri), sed danki pro, kvankam Zamenhof ofte uzis post danki por.

33. Participa adverbo.

Pri la origino de la nomitaj gramatikaj ni ne povas doni klarigon. Laŭ la reguloj validantaj en la Esperanta gramatiko, participa adverbo rilatas nur al la subjekto de la frazo. „Mi trovis lin fumante“ signifus, ke mi mem fumis. Eventuale oni povus ankaŭ diri: „Mi trovis lin fumantan.“ — „Hejmen“ estas adverba formo kun direkta -n, anstataŭanta prepozicion kun substantivo „en la hejmon“.

34. „Manko de Esperanto.“

Pri simila afero ni foje respondis en la „Leterkesto“ de Heroldo (n-ro 31/684 de 7.9.1932). Ni ne vidas mankon en tio, ke ne ĉiuj pronomoj tuĵ montras la sekson. Se indiko de la sekso estas nepre necesa, oni povas facile montri ĝin („mi, fraŭlino K., estas sola“ ktp.). Multe pli grava manko estus, se Esperanto posedus tri formojn por ĉiu pronomo, ĉar tia troa precizeco difektus ĝian facilecon kaj, per tio, malhelpus ĝian disvastigadon. Cetere, tio ne apartenas al tiu ĉi rubriko.

35. Komparativo.

Se la komparo montras malsaman staton de la komparataj personoj aŭ objektoj, oni prefere uzu la formon pli. La frazo: Ĉi tiu domo estas duoble pli alta ol tiu, estas do preferinda, kvankam la du formoj duoble tiel alta kaj duoble alta laŭ nia opinio ne estas malkorektaj.

36. Komparativo.

Vidu respondon 35! Sendube la citita frazo estas korekta.

37. Kiel — kvazaŭ.

Vere, la vorto „kiel“ iufoje estas dusenca; sed en la ekzemplo de s-ano F. J. B. tio ne bone evidentiĝas. „La reĝo akceptis sin kiel sian filinon“ povas signifi: li akceptis sin, ĉar ŝi estis lia filino, aŭ: li akceptis sin, kvazaŭ ŝi estus lia filino; — en tiu lasta kazo oni evitas miskomprenon, sekvante la konsilon de F. J. B., uzante „kvazaŭ“ (kvazaŭ sian filinon). „Edzinon kian serpenton“ oni ne povas diri.

38. Artikolo.

UEA estas nomo, kaj antaŭ nomoj oni kutime ne uzas la artikolon. La ĝenerala sekretario de Ligo de Nacioj; la prezidanto de Int. Centra Komitato; li veturis al Hispanujo; ŝi estis en Parizo.

Survoje al Konsilanta Gramatiko.

Redaktanto: Teo Jung.

Materialon por ĉi tiu rubriko oni direktu al s-ro Teo Jung, Brüsseler Str. 94, Köln, Germ.; ĉiun ceteran materialon por „Lingva Kritiko“ al s-ro Stefano La Colla, Via Dan-dolo 24, Roma (114), Italujo.

*

Gramatikaj demandoj.

28. Scii, koni.

Sur la unua paĝo de L. Kr. n-ro 5 okazas la vortoj „Estas konate ke D-ro Z . . .“ Nu, se oni devas anstataŭigi la esprimon: „Oni konas ke“ per: „Oni scias ke“, kial permesi: „Estas konate ke“ anstataŭ: „Estas sciate ke“? (W. H.)

29. Elpenetri.

El „Printempo en la aŭtuno“, komence de 1^a tria ĉapitro: „Tra fendeto de la tendo malforta radio elpenetris en la duonhelon.“ Sendube Baghy intencas: „Radio, eliginte el la tendo tra fendeto, penetris en la duonhelon.“ Sajnas, ke pro la senco „eniĝi internen“ de penetri la kunmeto „elpenetri“ iom strange impresas. (M. P.)

30. Tempoformo (-ata, -ita).

Cu en la sekvonta frazo la participoj estas korektaj? „Ili iris en la arbaron; tie ili estis atakitaj kaj kaptitaj.“ Laŭ la kunteksto la atakado kaj kaptado okazis nur post la irado en la arbaron. (M. W.)

31. Participa adverbo.

Ofte oni senprincipe uzas la adverban formon anstataŭ la adjektivan. Malbona ekzemplo estas: „Flournoy, ĉeestinte kunvenon, komparis . . .“ (en „Historio de la Lingvo Esperanto“ II, p. 40). La participo ofte tute ne rilatas al la ago, sed nur al la subjekto, en tia kazo oni uzu la adjektivon! (F. J. B.)

32. Prepozicio (por, pro).

Oni dankas helpiton pro helpo por la helpito (ekz. si mem). Kiel oni klarigas: „Mi dankas vin por la prunto“ (Fund. Ekzercaro § 14)? (F. J. B.)

33. Participa adverbo.

Mi deziras scii la originon de la gramatikaj: venante, hejmen, kaj fumanta, en la esprimo: „Venante hejmen, mi trovis lin fumanta.“ (G. W. L.)

34. „Manko de Esperanto“.

Ni diras: Mi estas sola; mi ne povas esti kontenta; vi estas malsana; vi sentas vin

entuziasmigita. Sed kiu? ĉu viro, ĉu virino? El ĉi tiuj ekzemploj oni ne povas scii, kiasaksa estas la subjekto. Ne ekzistas dubo, ke ĉi tio estas Esperanta „manko“. (A. H.)

35. Komparativo.

Kio estas ĝusta aŭ pli ĝusta: Jen estas alta domo; sed ĉi tiu estas duoble pli alta (aŭ: duoble tiel alta, aŭ: duoble alta)? (B. K.)

36. Komparativo.

Cu la frazo: „Li vivas aliloke ol mi“ estas ĝusta? (F. J. B.)

37. Kiel — kvazaŭ.

„Li havas edzinon kiel serpento(n).“ Tiajn frazojn mi ofte trovas. Mi opinias, ke ĉi tiu frazo signifas: 1. sen n post serpento: li havas sin tiamaniere, kiel serpento havus sin; 2. kun n post serpento: li havas sin, kiel li havus serpenton. Kiam oni tamen volas diri, ke li havas edzinon tian, kia estas serpento, oni povas diri: „Li havas edzinon kvazaŭ serpenton.“ Cu oni povas diri: „edzinon kian serpenton“? (F. J. B.)

38. Artikolo.

Ofte mi legas: de UEA. La UEA ne estas ajna Esperanto-Asocio; kial do ne: de l' UEA? (F. J. B.)

Respondoj.

20. Fonetiko.

Oni povas facile elparoli pli bone. Kial oni diras: herpkampo, nastuko, Polando ktp., anstataŭ diri (kaj skribi) herbokampo, nazotuko, Pololando? Germanoj, nederlandanoj k. a. pli atentu la literon „v“. Tro ofte mi aŭdas: „kŭar firoj“ anstataŭ „kvar viroj“. (F. J. B.)

28. Scii, koni.

Ni opinias kun s-ro H., ke la formo: estas sciate ke ĝenerale, ankaŭ en la citita kazo, estas pli korekta ol: estas konate ke.

29. Elpenetri.

La difino de penetri en la vortaroj ne estas kompleta. Penetrado estas moviĝo, same kiel irado, kurado kaj, kiel tiuj, havas elirlokon kaj alirlokon. Do iu objekto povas elpenetri kaj enpenetri, same kiel iu objekto povas eliri kaj eniri.

30. Tempoformo (-ata, -ita).

Vi estas prava: laŭ la logiko la frazo ne estas korekta; korekte devas esti: „atakataj

Letero al Teo Jung pri la pasivaj participoj.

Ne, mia kara Jung, viaj klarigoj pri Atalanta ne igis por mi la problemon multe pli klara: sendube mi estas leganto de grumbema humoro aŭ de malvasta spirito, aŭ ambaŭ kune. Sed tiaj „ĵongloj“, kiel vi faris per pure elpensitaj ekzemploj, kaj via aserto, ke la Esperanta gramatiko estas ĉiam simpla, ne povis min konvinki; kaj eĉ pikis min ia dubo, ĉu plene taŭgas la metodo, kiun uzis ĝis nun ĉiuj studintoj de tiu problemo. Ĉiuj efektive, De Beaufront, Aymonier, Fruictier, Stamatiadis kaj vi mem, atentis nur la signifon kaj valoron de la participaj sufiksoj, malzorgante la aliajn ĉirkaŭajn frazerojn, kaj precipe la verbradikon, al kiu gluiĝas tiuj sufiksoj. Sola escepto estas K. Kalocsay, kiu en sia „Lingvo, Stilo, Formo“ (pĝ. 84) antaŭsentis la irotan vojon.

Ofte la uzebleco de afikso dependas de la signifo de la apuda radikoj; kelkaj povas esti uzataj nur kun ia speco de radikoj (oni ne vidas, kiam sencon havus ekz. **bokaldrono** aŭ **ekbotelo**); kelkaj aliaj modifas sian signifon laŭ la radikspeco (ekz. Ad ne havas la saman signifon post verba — **paŝado** — kiel post substantiva — **kronado** — radikoj; simile **Uj** post nomo de floro — **rozujo** — aŭ de homo — **Turkujo** —; ktp.). Estas do kompreneble, ke por difini la ĝustan uzadon de At kaj It konvenas iom esplori la efikojn kaj reefikojn inter tiuj afiksoj kaj la diversaj verbaj radikoj. Vi diras — cetere tute prave — ke esence Ata signifas samtempecon (daŭron) de la ago, kaj Ita antaŭtempecon (finitacon) de la ago. Sed vi forgesis diri, ĉu ĉiuj agoj povas egale esti prezentataj kiel daŭrantaj aŭ finitaj; sendube vi avertis kontraŭ miskompreno de tiuj terminoj, precizigante, ke ne temas pri absoluta daŭro aŭ finiteco; konsentite. Tamen por ke du agoj estu samtempaj, ĉiu el ili devas posedi ian percepteblan daŭron; alie la samtempeco estus tute neperceptebla. Nu, ĉu agoj kiel **perdi**, **forgesi**, **elpensi** ktp. povas esti konsiderataj laŭ la kategorio de la daŭro? Aliflanke, por ke ago estu perceptebla kiel antaŭtempa al alia, ĝi devas produkti ian rezulton, kiu mem state daŭru; ekz. kiam finiĝis la ago **skribi**, restas la rezulto kiel io **skribita**. Sed ĉu la verbo **koni** apartenas al la sama kategorio? Kion signifas io **konita**? Io, kion oni **konis** kaj ankoraŭ **konas** — aŭ io, kion **ekkoninte**, oni ne **konas** plu? Saman heziton konfesas Fruictier pri analoga verbo **ami**, en la de vi citita frazo: „**mi estas amita de mia frato**: antaŭe mia frato amis min; nun li verŝajne ne amas min . . .“ Tiu „verŝajne“ pruvas, ke pri verboj de tiu kategorio, la sufikso It ne sufiĉas per si mem por signifi la finitecon de la ago, sed bezonas esti plifortigita de helpverbo en estinta tempo.

Se ni volus do klarigi la uzadon de Atalanta, ni devus unue klasigi la verbojn laŭ tri klasoj: unue, tiujn, kiuj esprimas agon konceptatan kiel esence daŭran, kaj kies finiĝo komencigas radikale novan staton, ekz. **ami**, **envii**, **havi**, **koni**, **memori**, **posedi**, **regi**, **signifi**, **ŝirmi**, **teni** ktp. . . . Tiuj verbojn oni povus nomi verboj de daŭro. Due, tiujn, kiuj esprimas agon posedantan pli malpli longan daŭron, sed kies finiĝo komencigas samnaturan daŭran staton, ekz. **detru**, **ekkoni**, **fermi**, **kaŝi**, **kondamni**, **legi**, **nomi**, **skribi**, **vundi** ktp. Tiuj verbojn oni povus nomi verboj de daŭro kaj rezulto. Trie, tiujn, kiuj esprimas agon, kies realigo estas preskaŭ neperceptebla, kaj kiuj estas sekve kon-

siderataj preskaŭ nur post sia plena finiteco, ekz. **elpensi**, **fini**, **forgesi**, **perdi**, **solvi** ktp. . . . Tiuj verbojn oni povus nomi verboj de rezulto. Oni jam ekvidas, ke la sufikso Ita estos malofte uzata kun la verboj de daŭro, kaj la sufikso Ata kun la verboj de rezulto.

Sed estas bezone eniri tie ĉi en pli malgrandajn detalojn, kaj por tio disponi sufiĉe precizan terminologion. Ni ekzamenas du momentojn de la daŭro, la estantecon kaj la estintecon. La estantecon povas esti esprimata per du tempoj: la **prezenco**, kiu prezentas agon nun faratan, kaj la **perfekto**, kiu esprimas la nunan staton rezultantan de pasinta ago. La estinteco povas esti esprimata per tri tempoj: la **imperfekto**, kiu prezentas pasintan agon kiel daŭrantan, la **aoristo**, kiu prezentas pasintan agon kiel nedaŭrantan, kaj la **pluskvamperfekto**, kiu prezentas pasintan agon kiel jam finitan antaŭ ia dato aŭ komenciĝo de alia ago. Multaj lingvoj, kiel la helena aŭ la franca, posedas apartan formon por ĉiu el tiuj kvin tempoj; la germanaj kunigas la imperfekton kaj la aoriston en unusolan formon, nomitan **preterito**; la latina kunigas la aoriston kaj la perfekton ktp., sed sub tiuj sintezaj formoj la logiko povas ĉiam analizi la suprecititajn tempojn, kies distingo estas utila por la preciza klarigo de la verba sistemo.

Ni vidu nun, kiujn formojn oni uzas por esprimi tiujn tempojn en ĉiu klaso de verboj.

A. Verboj de daŭro.

Ĉe tiuj verboj, la prezenco kaj perfekto samas, ĉar oni ne povas distingi tie ĉi ia agon de la rezulto de tiu ago; ni vidis supre, ke formo kiel „estas amita“ ne havas klaran sencon, kaj estas nur kreaĵo de troa simetriado. Pro la sama kaŭzo, la aoristo kunigigas kun la imperfekto. Restas do tri tempoj:

I. Estanteco.

1. **Prezenco**. La lando estas regata de reĝo.

II. Estinteco.

3.—4. **Preterito (Imperfekto-Aoristo)**. La lando estis regata de reĝo.

5. **Pluskvamperfekto**. La lando estis regita de reĝo, antaŭ ol Araboj konkeris ĝin.

B. Verboj de daŭro kaj rezulto.

Tie ĉi ambaŭ sufiksoj povas esti normale uzataj; sekve Ata montras pli draste la daŭron, kaj la nedaŭra estinteco estas esprimata per Ita. Sekve ankaŭe estiĝas konfuzo inter la aoristo kaj la pluskvamperfekto, kaj estas utile, por klarigi ĝin, almeti adverbon, kiel „antaŭe“ aŭ „jam“, aŭ uzi konjunkcion, kiel „antaŭ ol“.

I. Estanteco.

1. **Prezenco**. La akuzito estas kondamnita laŭ ĉiuj jureguloj.

2. **Perfekto**. La akuzito estas nun definitive kondamnita.

II. Estinteco.

3. **Imperfekto**. La akuzito estis kondamnita ĝuste, kiam alvenis la sciigo pri la amnestio.

4. **Aoristo**. Post longa diskuto, la akuzito estis kondamnita je morto.

5. **Pluskvamperfekto**. La akuzito estis jam kondamnita, kiam oni eksciis pri lia senkulpeco.

C. Verboj de rezulto.

Ĉar, por tiuklasaj verboj, oni povas preskaŭ neniam percepti la efektiviĝon de la ago, la tempoj formitaj per Ata (prezenco kaj imperfekto) ne estas kutime uzataj. Oni havas do:

I. Estanteco.

2. **Perfekto**. Mia ŝlosilo estas perdita.

II. Estinteco.

4. **Aoristo**. Mia ŝlosilo estis perdita de vi.

5. **Pluskvamperfekto**. Mia ŝlosilo estis jam perdita, kiam vi perdis la vian.

Ne ĉiuj tri verbkategorioj estas egale multnombraj: la dua estas la plej grava kaj ofta, poste venas la unua, kaj fine la tria. Tamen tiu iom ampleksas tabelo ne nur precizigas plurajn el viaj konkludoj, sed precipe ĝi kontraŭstaras unu el ili, nome, ke „estas preferinde uzi la Ita nur, kiam oni volas klare esprimi la antaŭtempecon de ia ago rilate al la momento, pri kiu oni parolas“. Via teorio postulas do, ke en la verbklasoj B kaj C, oni uzu Ata ĉe la aoristo; tamen la ĝenerala uzado, kaj eĉ la logiko emas montri la aoriston per Ita, kaj nete distingi tiun tempon de la imperfekto. Estas eble bedaŭrinda, sed tia estas la konstanta uzado de Zamenhof, en liaj lastaj verkoj, kaj de multaj aliaj verkistoj. Por ne longigi supermezure tiun leteron, mi citos nur kelkajn ekzemplojn de Zamenhof, tiritajn el la 3-a volumo de la Andersen-fabeloj. Sed, ĉar tiaj frazoj ordinare klariĝas precipe per la ĉirkaŭteksto kaj la ĝenerala tono de la rakonto, precizigoj, kiuj mankas al tiuj ĉi mallongaj citaĵoj, mi opinias necese difini ilin per traduko, kaj por eviti naciajn influojn, mi tradukos ilin latine: oni memoru nur, ke en tiu lingvo, perfekto kaj aoristo esprimiĝas per la sama formo (amatus sum). Cetere ĉiuj cititaj verboj estas de la klaso B.

(pĝ. 44.) La plej aĝa proponis, ke oni faru . . . ekspozicion; kaj tiu propono estis **akceptita** (aoristo): et hoc propositum **acceptum est**.

(pĝ. 103.) La historio rakontis pri hungara kavaliro, kiu **estis kaptita** (pluskvamperfekto) de turka guberniestro . . . : historia narrabat de hungaro equite, qui **captus erat** a . . .

(pĝ. 104.) Preskaŭ nekredibla estis la el-aĉeta mono, kiu **estis postulata** (imperfekto); la mono tamen **estis kolektita** (aoristo) kaj oni liberigis lin de sklaveco: fere incredibile erat redimendi pretium, quod **postulabatur**; pecunia tamen **collecta est**, et ille liberatus est seruitute.

(ibidem) Guste tiu guberniestro, kiu estis ordoninta aljungi lin al la plugilo . . . fariĝis nun lia kaptito, kaj **estis metita** (aoristo) de li en la malliberejon: tum uero hic proconsul, qui iusserat eum aratro iungi, factus est nunc eius captivus, et coniectus est ab eo in carcerem . . .

(ibid.) „ . . . donu al mi la eblon morti kiel křistano.“ Kaj lia peto **estis plenumita** (aoristo). Tiel rakontis la historio, kiu **estis voĉlegita** (aoristo): da mihi, ut moriar uelut christianus. Et eius preces **exauditae sunt**. Sic narrabat ea historia, quae magna uoce **lecta est**.

(pĝ. 113.) La maljuna fraŭlino povis trovi uzon por ĝi, kaj tial la botelkolo . . . **estis provizita** (aoristo) per korko, kaj tiu ĝia parto, kiu antaŭe **estis turnita** (pluskvamper-

fekto) supren, nun **estis** turnita (aoristo) malsupren: anus potuit inuenire, quomodo utatur ea re; itaque hoc lagonae collum **munitum est** linimento (? En mia libertemp-
eĵo mi ne havas rimedon por ekscii, ĉu Romanoj uzis korkojn.), et haec eius pars, quae primum **directa erat** sursum, nunc **directa est** deorsum.

Mi kredas, ke tiuj ekzemploj estas sufiĉe klaraj kaj pruvaj, favore al mia tezo, kaj kontraŭe al la via. Sekve la frazo „la konsilantaro decidis amnesti 60 negrojn; ili estis kondamnitaj je morto“ estas ja almenaŭ konfuza, kaj oni devis ĝin klarigi per aldono de adverbo, kiel **antaŭe**, aŭ per ŝanĝo de la formo.

Mi konfesas, ke estus pli harmonie konfuzi, en pasivo same kiel en aktivo, la imperfekton kaj la aoriston sub sama formo de preterito, sed **fakte** tio ne ekzistas ĉie: kaj ne temas tie ĉi pri facilanima liberalaĉo, sed pri regula uzado de Ita en aoristo kun certa klaso da verboj.

Sendube ankaŭ miaj klarigoj ne estis ĉiam tre klaraj, kaj mi pro tio petas vian indul-

gon; sed la materio estas malfacila, kaj lingvo, eĉ simpligita kiel Esperanto, estas ĉiam tre kompleksa mekanismo. Cetere mi ne dubas, ke viaj — kaj eble aliulaj — kritikoj helpas por ĵeti pli da lumo sur tiun gravan problemon. Atendante ilin, mi restas kore via,
G. Waringhien.

P. S. Permesu al mi profiti la okazon por mallonge respondi al du kritikoj koncerne unu mian artikolon:

N-ro 16 (uzado de li por infano). Mi klopis nur la lastan frazon de la tiutema Lingva Respondo de Z.: „Cetere parolante pri infano, pri kiu ni scias, ke ĝi ne estas knabino aŭ almenaŭ ne scias, ke ĝi estas knabino, ni povas uzi la vorton li“. (La substrekoj estas Zamenhofaj.)

N-ro 17 (post ol). Mi renkontis tiun formon en Lingvo Internacia, ĉirkaŭ la jaro 1907 (mi ne povas pli precizigi, ĉar tie ĉi mi havas nek librojn, nek notojn). Cetere mi konfesas, ke **antaŭ** kiam kaj **post** kiam estas pli logikaj, sed tiel pezaĵ!

jam: pli frue ol atendite, entenas ŝanĝadon.

Atentu: **mi jam vidos lin**: mi vidos lin pli frue ol atendite;

mi plu vidos lin: dum pli longa tempo;

mi pli vidos lin: pli multajn fojojn;

mi ankoraŭ vidos lin: denove, post ĉi tiu fojo.

Ekz.: **Li jam estas ĉi tie** (pli frue ol atendite);

la akvo jam bolas (pli frue ol atendite);

li jam venas ĉi tien (pli frue ol atendite).

ne jam = la vorteto **ne** neas la signifon de **jam**, kaj la **senco** de ŝanĝado malaperas, do „ne jam“ = neŝanĝado.

Ekz.: **li ne jam estas ĉi tie** (li ne estis kaj ne estas).

Komparu: **li ankoraŭ ne estas ĉi tie** (ne estis kaj ne estas, do daŭrigado de la nea fakto).

Do: **ne jam** = ankoraŭ ne.

jam ne: rilatas al la estinteco; indikas ŝanĝadon de stato, de intenco, aŭ neplenumitan deziron.

Ekz.: **la akvo jam bolas**;

la akvo jam ne bolas (ĝi bolis, sed nun, ŝanĝo de stato, ĝi ne bolas).

Atentu: **la akvo ne plu bolas** (ne daŭrigas, halto de la daŭrigado).

Fakte la du frazoj signifas la samon, sed iafaje ni devas distingpovi precize;

Ekzemple:

li jam ne havas eblecon lerni;

li ne plu havas eblecon lerni.

En la unua ekzemplo li neniam havis tiun eblecon; en la dua li ĝin antaŭe havis.

Leo Calloens, Aalst.

*) Tio, tamen, estas komprenebla ne absolute. Ekzemple: „Li ankoraŭ venos ĉi tien“ povas signifi ke li ankoraŭ ne venis, sed ke oni supozis ĝis nun ke li venos, kaj ke oni ankoraŭ povas supozigi ĝin. — Rim. de T. J.

Pli — plu — ankoraŭ — jam.

Car multaj lernantoj — eĉ instruistoj, laŭ mia sperto — dubas pri la korekta uzado de ĉi tiuj vortoj, mi klarigos ilin plej precize, speciale en ilia nea formo.

pli = kvanto, kvalito, komparativo.

Ekz.: **pli da akvo** (kvanto), **pli bona** (kvalito), **pli laŭte kanti** (komparo).

ne pli: „pli“ restas samsenca.

Ekz.: **mi faris ne pli ol vi, sed nun mi sola estas punata**;

mi havas nenion pli (mi ne havas pli grandan kvanton).

plu = daŭrado en la tempo kaj spaco.

Ekz.: **li manĝas plu** = li daŭrigas manĝi (en la tempo);

li manĝas pli = li manĝas pli grandan kvanton;

iru plu(en) = iru pli malproksimen (en la spaco)!

ne plu: rilatas al la estanteco, kaj la antaŭa daŭrado en tempo kaj spaco malaperas (ĉesas).

Ekz.: **ne ploru plu** = ne daŭrigu plori (vi ploris sed nun ĉesu);

li ne parolis plu = li ne daŭrigis (paroli) la paroladon.

Atentu: **li jam ne parolis** = li rezignis la paroladon (li antaŭe ne parolis).

En „La Vojo returne“ mi legas la sekvantajn ekzemplojn:

1. li haltas kaj ne iras plu;
2. ĉi tie estas ankoraŭ la milito, ne plu en la cerboj de l' postrestintoj;
3. tiam la pasinteco ne plu persekutos, sed helpos min.

ankoraŭ = signifas neŝanĝadon, ĝis nun, rilatas al la pasinteco.

Ekz.: **li ankoraŭ estas ĉi tie** (li estis kaj estas ĉi tie);

la akvo ankoraŭ bolas (ĝi bolis kaj bolas);

li ankoraŭ venos ĉi tien (li venis* antaŭe kaj venos estonte).

ankoraŭ ne: la vorteto **ne** influas la sencan de la sekvanta verbo, sed la signifo de **ankoraŭ** restas neŝanĝita.

Ekz.: **li ankoraŭ ne estas ĉi tie** (li ne estis* kaj ne estas);

la akvo ankoraŭ ne bolas (ĝi ne bolis kaj ne bolas);

li ankoraŭ ne venos ĉi tien (li ne venis* kaj ne venos);

Atentu: **li ne plu venos ĉi tien** (li antaŭe venis kaj nun ne venos plu).

ne ankoraŭ: la vorteto **ne** influas la sencan de **ankoraŭ**: la esprimo **ne ankoraŭ** entenas ŝanĝadon, la daŭrado malaperas, ĉesas.

Ekz.: **li ankoraŭ estas ĉi tie** (li estis kaj estas);

li ne ankoraŭ estas ĉi tie (li estis antaŭe kaj nun ne estas);

la akvo ne ankoraŭ bolas (bolis antaŭe, nun ne bolas);

li ne ankoraŭ venos ĉi tien (li venis, sed de nun ne venos).

Studejo de Zamenhofa Gramatiko, Tokio:

Teksto-Kritiko de la Paroladoj de Zamenhof

(Daŭrigo. Komencan vidu en L. Kr. N-ro 7.)

Oficiala Parolado ĉe la Festeno.

OV ref: Schn

Nia ref: —

(Schneeberger estas la sola fonto el kiu elĉerpis OV kaj ne kontrolebla per aliaj tekstoj.)

368-16. Mian glason mi levas pro la bona stato. Sur la sama paĝo en la linioj 18, 24, 28 (dufoje), ni vidas por uzata en similaj okazoj:

-18. Mi levas mian glason por la bona stato.

-24. Nun mi volas ankaŭ trinki por la sano.

-28. Ni trinku por ĝia sano.

laŭ Originala Verkaro de D-ro Dietterle.

-28. ni trinku entute ĝenerale por la gloro. Zam-uzado de ĉi tiu esprimo estas ĝenerale „pro la sano“, sed „por“ en kunmetita vorto:

Batalo 69-28 li . . . afable trinkis pro la sano de la domo.

Fabeloj I 45-5. trinku pro la sano de . . .

Fabeloj II 94-7. ni trinkis unu kun la alia porfratiĝon.

Fabeloj II 96-4. li anstataŭ interfrapado de la glasoj faris porsanan signon per siaj okuloj.

Fabeloj II 97-13. deziros fari parolojn kaj trinki porfratiĝon.

Fabeloj II 97-15. trinkis porfratiĝon.

Gimnazio 61-21. La gastoj trinkis pro sano.

Hamleto 168-25. La reĝo tiam trinkos pro la sano.

Hamleto 169-2. Pokalon malplenigas pro Hamleto!

Rabistoj 16-18. ili devas trinki nepre pro ies sano.

Rabistoj 28-16. mi povas rideti, kiam mia plej granda malamiko trinkas la sangon de mia propra koro pro mia sano.

368-26/7. kiuj volonte partoprenus kun ni al la granda kongreso. Kun la verbo **partopreni** Zam ĉiam kaj senescepte uzis en antaŭ substantivo montranta celon de partopreno, kaj ni multe dubas, ĉu li efektive diris al. (Rimarku ke tiu ĉi aperas en la parto stenografita kaj ne kontrolebla per aliaj tekstoj.) Laŭ nia esploro Zam neniam diris „partopreni la kongreson“, des malpli . . . al la kongreso“. Lia kutima kaj ĉiama esprimo estas „partopreni en la kongreso“. (Por la plena listo de partopren uzita de Zam, vidu „Indekso de Preni“ en la „Esperantisto“, Marto kaj Oktobro 1931.)

Dua Kongreso 1906 en Genève.

OV ref: R LI ED.

Niaj ref: R LI ED Ĉas Möb Brüg.

368-39/40. mi esprimos en la nomo de vi ĉiuj mian koran dankon. R, Ĉas kaj Brüg legas **nian**; LI, ED, Möb kaj OV legas **mian**. La kunteksto, en la nomo de vi ĉiuj, favoras legadon de **nian**. Komparu: 374-21, 384-36, 403-24, 404-24, 454-26.

368-40/1. al la brava svisa lando por la gastameco, kiun ĝi montris. LI, ED, Möb kaj OV legas kiel supre. R, Ĉas kaj Brüg legas: „al la brava svisa lando kaj al ĝia registaro por la gastameco, kiun ili montris“.

368-41. por la gastameco, kiun ĝi montris al nia Kongreso, kaj al lia Moŝto. Tiel staras en LI, ED, Möb kaj OV. Anstataŭ kaj R, Ĉas kaj Brüg legas **precipe**.

369-4. la historion de diversaj gravaj internaciaj aferoj. Tiel legas LI, ED, Möb kaj OV. La aliaj tri, R, Ĉas kaj Brüg legas: diversaj gravaj internaciaj kaj homunuigaj aferoj.

369-5/6. esprimi en la nomo de vi ĉiuj koran dankon. Legas kiel supre LI, ED, Möb kaj OV. En R, Ĉas kaj Brüg troviĝas **nian** antaŭ koran dankon.

369-17. vi atendas de mi ian paroladon. LI, ED, Möb kaj OV legas **paroladon**, dum R, Ĉas kaj Brüg legas **parolon**. Estas malfacile nun juĝi, kiun vorton Zam aktuale uzis ĉi tie, sed de la similaj vortoj kelkfoje ripetitaj malsupre (en kiuj ĉiuj tekstoj koincidas) ni povus konjektii, ke li uzis **parolon**. Komparu: 369-19 (paroloj, parolon), 369-20 (parolojn), 369-21 (parolo).

369-22/4. nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas por libereco, por la plej elementa homa libereco, por la rajtoj de homo. ED, Möb, Brüg kaj OV legas **ĝuste** kiel supre. R, LI, Ĉas ĝuste legas: **batalas pro libereco, pro . . . libereco, pro la rajtoj**. Komparu: Marta 2-31, 59-5, 139-6, 175-27.

369-27/8. tiu ĉi batalado ne povas vin tuŝi. Kiel supre legas R, Ĉas, Brüg kaj OV. Pli malforta povus sin trovas en LI, ED kaj Möb. Ni persone kredas, ke Zam uzis la

unuon pli decidan vorton, pro la kunteksto: „kaj nia Kongreso havas nenion komunan kun aferoj politikaj.“

369-31/2. ni vidas en tiu lando kruelan batalon inter la gentoj. OV sola legas **batalon**, dum ĉiuj aliaj **bataladon**. Komparu kelkajn liniojn supre kaj malsupre, kie aperas **batalado** kvin fojojn.

30-16/7. ne la Tataroj kaj Armenoj estas kulpaj en la konstanta buĉado. R, Ĉas kaj Brüg legas ĉe la fino: la konstanta buĉado en **Kaukazo**. La lastaj du vortoj en **Kaukazo** ne troviĝas en LI, ED, Möb kaj OV. Ni kredas, ke estas preterinde havi la du vortojn pro la kunteksto: la konstanta buĉado; kaj ankaŭ 370-15: la besta buĉado en Bjelostok.

370-21/2. per diversaj kaj plej malnoblaj rimedoj. Tiel legas LI, ED, Möb kaj OV. La aliaj tri, R, Ĉas kaj Brüg legas: per diversaj **plej ruzaj** kaj **plej malnoblaj** rimedoj. La dua legado ŝajnas pli bona, ĉar en la unua legado kaj ne estus necesa: **per diversaj plej malnoblaj rimedoj**. En la dua diversaj modifas „plej ruzaj rimedoj“ kaj „plej malnoblaj rimedoj“.

370-22. per amase disemataj mensogoj. R, Ĉas, Brüg kaj OV legas kiel supre, dum LI, ED kaj Möb donas senkoloran, kvankam ne rekte eraran „disemataj“ anstataŭ „disemataj“.

370-40/1. bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de sinnekonado. En la lasta parto R, Ĉas kaj Brüg legas **reciproka** antaŭ **sinnekonado**, kiu legado pli klarigas la sencon kaj estas preferinda. La vorto „reciproka“ ne troviĝas en LI, ED, Möb kaj OV.

371-10/1. kiu revas unuigi per Esperanto la homaron, esperantisto estas ankaŭ tiu persono. La tuta frazo, kiu troviĝas en R, Ĉas, Brüg kaj OV, mankas en LI, ED kaj Möb.

371-11. kiu uzas Esperanton ekskluzive. Tiel legas R, Ĉas, Brüg kaj OV. La aliaj tri tekstoj, LI, ED kaj Möb legas: kiu uzas Esperanton sole kaj ekskluzive. La du vortoj aldonitaj ŝajnas superflujaj.

371-15/6. kiu uzas Esperanton por celoj plej malnoblaj kaj hommalamaj. R, Ĉas, Brüg kaj OV legas kiel supre. LI, ED kaj Möb legas simple **malamaj**. Komparu Dandin 12-26: „kiun ŝi aŭskultis tre homame.“

371-22/3. en tiu formo kaj grado, kiel li mem deziras. R, Ĉas kaj Brüg legas en kiu anstataŭ kiel.

371-28/9. ĉiu alia espero aŭ revo, kiun tiu aŭ alia persono ligas kun la esperantismo. Kiel ĉi tiu teksto de OV legas ankaŭ LI, ED kaj Möb, dum R, Ĉas kaj Brüg legas **esperantisto anstataŭ persono**. La originala teksto, kiu troviĝas en OV 237-30/1, favoras la duan legadon.

372-34/6. ĉar ĉiu parolis pri ĝi kaj sindone kaj senprofite laboris kun ni. Kial do aliĝis al ni la personoj, kiuj vidas en Esperanto „nur lingvon“? Ĉi tie troviĝas diversaj legadoj, kiuj multe diferencas unu de alia.

1. R, Ĉas, Brüg: ĉar ĉio parolis pri ĝi. Kial aliĝis al ni kaj sindone kaj senprofite laboris kun ni la personoj, kiuj vidas en Esperanto „nur lingvon“?

2. LI, ED: ĉar ĉio parolis pri ĝi, kaj sindone laboris. Kial do aliĝis al ni la personoj kiuj vidas en Esperanto „nur lingvon“? — „Ĉio“ en la unua linio verŝajne reprezentas „ĉiuj verkoj, vortoj kaj agoj“ troviĝantaj tri liniojn supre de la sama paĝo. Zam uzas ankaŭ aliloke „ĉio“ por unuige esprimi diversajn aferojn, kaj la vorto estas pravigebla en la 1-a legado. Sed la translokiĝo de „sindone laboris“ en la 2-a legado faras la sencon stranga kaj ne pravigebla: „ĉio laboris“. Krom tio en la 2-a legado ne troviĝas la vortoj, kun ni kaj kaj senprofite.

3. Möb (sola): ĉar ĉiu parolis pri ĝi, kaj sindone laboris. Kial do aliĝis al ni la personoj, kiuj vidas en Esperanto „nur lingvon“? — Möb, kiu ĝenerale simple kopiis ED, kredeble vidis nelogikecon de „ĉio laboris“ kaj eble pro tio ŝanĝis „ĉio“ al „ĉiu“. „Ĉiu (homo) parolis kaj laboris“ ŝajnas iom ekstrema, sed se ni povas limigi la sencon de „ĉiu“ al „ĉiu el ni fervoraj esperantistoj“, ni povus ĝin pravigi. Ĉi tie ankaŭ mankas kompare kun la 1-a legado la vortoj, kun ni kaj kaj senprofite.

4. OV (sola): ĉar ĉiu parolis pri ĝi kaj sindone kaj senprofite laboris kun ni. Kial do aliĝis al ni la personoj, kiuj vidas en Esperanto „nur lingvon“? — OV kredeble rimarkis en Möb la forlason de kun ni kaj enmetis la vortojn, sed tio donis al la teksto strangan aspekton: „ĉiu laboris kun ni“. Kiu estas tiu „ĉiu“? Ĉu „ĉiu“ estas alia ol „ni“? Legu kelkajn liniojn de supre kaj oni vidas nelogikecon de ĉi tiu legado.

Ni nun revenu al la 1-a legado kaj atente relegu ĉiun vorton. Pri la unua parto „ĉar ĉio parolis pri ĝi“ ni jam vidis kaj tial ni iom esploru la duan demandfrazon: „Kial do aliĝis al ni kaj sindone kaj senprofite laboris kun ni la personoj, kiuj vidas en Esperanto „nur lingvon“?“ La duobla karaktero de la aliĝintoj montrita ĉi tie — sindone kaj senprofite laboris kun ni, sed tamen ili diras, ke ili vidas en Esperanton „nur lingvon“ — estas subtenata ankaŭ de la sekvantaj linioj: „iliaj paroloj estas kontraŭaj al iliaj propraj sentoj“, „ili senkonscie revas pri tio sama, pri kio ni revas, kvankam . . . ili penas tion ĉi nei“. Tian nuancon oni ne vidas en la 2-a, 3-a aŭ 4-a legado.

373-15/6. Bulonjo sur Maro. En ĉi tiu sola loko kaj nenie aliloke en la Paroladoj R, LI, ED kaj Möb legas: **Bulonjo ĉe l' Maro**. Ĉas, Brüg kaj OV legas kiel supre.

373-35. ni sentis, ke ni estis atestantoj. OV sola legas **estis** anstataŭ **estas**, kiun ĉiuj aliaj donas. La kunteksto favoras la estantan tempon por esti. Komparu 373-36: ni sentis, ke komenciĝas . . . 373-36: ni sentis, ke antaŭ niaj okuloj flugas . . .

374-1. kredeble ne venos. Tiel legas R, Ĉas, Brüg kaj OV, dum LI, ED kaj Möb legas **venas** anstataŭ **venos**. En la sama linio troviĝas alia „venos“. Ĉe ĉi tiu dua „venos“ ĉiuj tekstoj koincidas, kio donas preferon de la estonta formo al la unua „venos“. (Daŭrigota.)

Ĉiun redakcian materialon

sendu al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo; sed la materialo por „Konsilanta Gramatiko“, redaktata de s-ro Jung, estas sendota al lia adreso en Köln.